ELDONANTOJ:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norta, Barcelona
Teo Jung, Köln (Kolonjo)
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

REDAKTOROJ:
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.
Kun-redaktoro: M. Butin.
Felietona red.: Zanoni.

ADMINISTREJO:
Horrem bei Köln, Germ.
Poŝtĉekkonto Köln 70863, por Teo Jung, Horrem.

ANONCOJ
po cm², 0.10 svisa franko (aŭ ĉe antaŭpago 6 gmk.)
Rabato laŭ interkonsento.

ESPERANTO
★ TRIUMFONTA ★

Internacia **SEMAJNA** **Neŭtrala**

Abonon ĉiu pagas laŭ la taga kurzo de sia propra valuto, se eble per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero, aŭ per ĉeko, sed **ne** per poŝtmandato. — Abonantoj, **kies** abono estas finiĝonta, ricevas ĝustatempe **admonilon.** — Abonoj povas esti -- -- - komencataj per iu ajn numero. - -- --

Por **Abono** oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. — **Prezo de unu numero:** 0.06 dolaro, 0.15 guld., 0.24 sved. kr., 0.30 svis. fk., 0.30 dana aŭ norvega kr., 0.30 peseto, 3½ pencoj, 0.50 fr. aŭ belg. fk., 0.70 liro, 1.20 fmk., 1.40 ĉ. kr., 6 germ. mk. (por baltaj kaj balkanaj ŝtatoj), 3 germ. mk. (por rusoj), 10 hung. kr., -- -- -- 50 pol. mk., 2.0 aŭstr. kr.; internacie 1 respond-kupono. -- -- --

Por adresŝanĝoj ni kalkulas la prezon de 3 numeroj. — Liston de niaj **Abonejoj** en diversaj landoj -- -- -- -- - vidu sur paĝo 4! - -- -- -- -- Germanoj abonu nur ĉe sia poŝtoficejo (kvaronjare 48 mk.); senpera alsendo sub banderolo -- kostas por germanoj po numero 7 mk. --

N I
havas la plej bonan volon;
V I
kunagu!

Numero 95 :-: **Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa** :-: **30. Julio 1922.**

„Fondu nian Literaturon! Sen ĝi ni ne ekzistos!"

diras tute prave s-o Kalina en sia artikolo „To be or not to be", ET n-o 93. La verkinto pensas ĉefe je l i b r o j, per kiuj ni „riĉigu nian literaturon", kaj pro kio li incitas fondon de propra libroeldonejo. Sed por libroeldonejo ni bezonas librojn, por havi librojn, ni bezonas verkantojn, por havi verkantojn, ni bezonas perfektajn Esperantistojn.

„Nia afero estas precipe lingva afero." Do ni klopodu antaŭ ĉio, eduki perfektajn Esperantistojn. Sen tiaj ni neniam havos riĉan literaturon, la literatura laboro restos por ĉiam sur la ŝultroj de „eta taĉmento de kelkaj laboreguloj".

Rilate al la lingvo mankas ankoraŭ multo ĉe ni. Nur tro malofte oni renkontas samideanojn, kiuj senerare skribas kaj parolas Esperanton, kiuj vere „regas" la lingvon. Certe inter ni estas multaj, kiuj posedas bonan talenton kaj emon por verki, kiuj nacilingve bonsukcese verkas, sed kion utilas al ni kaj al nia afero la plej bona talento, se ili pro manko de intereso aŭ pro alia kaŭzo ne sufiĉe scias nian lingvon? Do pligrandigu la aron de perfektaj Esperantistoj kaj instigu ilin riĉigi nian literaturon per siaj verkoj.

Rilate al eldono de l i b r o j **mi opinias, ke** fakte nur malmultaj **homoj, almenaŭ simplaj,** riskas verki aŭ traduki ampleksan libron. Tio estas kaj restos grandparte afero kaj tasko de eminentuloj kaj profesiaj verk i s t o j. La kaŭzo **estas** manko de tempo, nekonfido je **la kapablo kaj la malfacilaj eldonkondiĉoj. Sed mi ne dubas, ke ekzistas** multaj samideanoj, kiuj p o s t p e r f e k t i ĝ o e n l a l i n g v o estos kapablaj okaze traduki kaj originale verki bonajn literaturaĵojn — ne ampleksajn librojn —, ke ili volonte faros tion, se ili **havas la konvinkon, ke ili ne senutile laboras, se ili vidas eblon por presigi siajn verkojn.** Por ĉi tiu celo la **proponita** libroeldonejo estas tro granda aparato. Kion **faras** libroeldonejo kun m a l l o n g a tradukaĵo aŭ originala artikolo? Por tiaj okazaj verkaĵoj ni bezonas alian eldonejon — kiu laŭ mia opinio jam ekzistas. Tio **estas** nia gazetaro, precipe ET. Ni bezonas nur pligrandigi la literaturan parton, ĉar la semajna ET en la nuna formato ne sufiĉas por atingi la celon: „riĉigi la literaturon." Por ET la literaturo ne estas ĉefaĵo, sed nur apuda, kaj nur malmultaj artikoloj povas aperi. Pro tio mi proponas krei sufiĉe ampleksan aldonon al ET kun nura literatura celo kaj enhavo. Ne estos necese limigi la aldonon je okazaj kaj malgrandaj artikoloj. Povos aperi — almenaŭ ĝis la starigo de l' proponita libroeldonejo — ankaŭ pli ampleksaj tradukaĵoj kaj originalaĵoj kun oftaj daŭrigoj.



La grandioza Avenuo Mangue en Rio de Janeiro.
Kiel oni scias, en Rio de Janeiro okazos de 7. septembro 1922 ĝis 31. marto 1923 granda Nacia Ekspozicio Memoriga de la Unua Centjaro de l' Brazila Sendependeco. (Vidu ET n-o 86!)

Por **financigi la aferon,** mi proponas jenon:

1. ET **estas** abonebla s e n la aldonaĵo je kutima prezo. (Eldono A.)

2. ET k u n la aldonaĵo je pli alta prezo. (Eldono B.) (Pro manko de anoncoj la plialtigo de l' prezo certe estus granda.)

3. La aldonaĵo estas aparte havebla.

Mi ne dubas, ke eldono B **havos** la plej multajn **abonantojn.**

Faru kontraŭproponojn! Kion opinias ET mem?

Mallerta.

La opinio de ET.

Ĉar nia ŝatata kunlaboranto Mallerta petas nin mem esprimi nian opinion, ni faros ĝin malonge.

Tre prave kaj reale s-o Kalina atentigas en sia artikolo pri la neceso de mono por la aludita eldonejo; la propono en la dua parto de lia artikolo tamen ne estas praktika. Antaŭ ĉio, ne ekzistas 80 000 organizitaj Esperantistoj, kiujn oni povus devigi je pago de eĉ nur 5 frankoj. UEA havas malpli ol 5000 membroj, ET nur iom pli ol 3000 abonantoj, la nombro de Esperantistoj organizitaj en naciaj asocioj ne multe superas 10 000. Do la maksimuma nombro, kun kiu ni povas kalkuli, estas 12 000. Se ili pagus meznombre po 5 fk., la tuta sumo **estus** 60 000 fk. Tiu sumo nuntempe sufiĉus por instali ne tro grandan presejon-eldonejon en malbonvaluta lando, supoze ke ĉiuj 12 000 organizitaj Esperantistoj pagus la postulitan kotizon (donace!?), kio estus vera miraklo. Sed estas tre verŝajne, ke tia eldonejo ne povus ekzistadi, ĉar ĝia administra funkciado devus esti komplika kaj postulus grandajn elspezojn.

Cetere, kial fondi **novajn** entreprenojn anstataŭ subteni kaj plifortigi jam ekzistantajn, almenaŭ tiujn, kiuj **klopodas starigi sin sur realan, firman, negocan fundamenton?**

Jen kial la propono de s-o M. estas pli praktika. ET estas eble la sola Esperanta jurnalo, kiu — dank' al diversaj favoraj cirkonstancoj kaj dank' al ĝia nekomplika administrado — de novembro 1921 ĝis hodiaŭ ne rezultigis deficiton, sed eĉ modestan profiton, kaj kiu — ankaŭ sub malpli favoraj cirkonstancoj — povos daŭre ekzistadi sen deficito, se ĝi akiros ankoraŭ 1000—2000 abonantojn.

Koncerne la literaturan aldonon al ET, s-o M. faras proponon, kiu estas tute konforma al nia propra projekto kaj kiun parte ni jam realigis.

La unua **literatura aldono** jam estas presita en ĉ. 11 000 ekzempleroj, el kiuj 6500 estas senpage aldonotaj al la jubilea numero aperonta la 3-an de septembro, la resto estas destinita por aperi en libra formo, kiam la unue publikigata verko estos finaperinta.

La literatura aldono aperos komence ĉiumonate aŭ duonmonate po 16-paĝa; poste ĝi povos aperi ĉiusemajne en sama amplekso kaj fine eĉ 32-paĝa. (Ni atentigas pri simila evoluo de ET mem, kiu rezultigis tiom da sukceso!) Tio dependos tute de la apogo, kiun la literatura aldono havos de abonantoj kaj aĉetantoj. Imagu: ĉiusemajna, 32-paĝa literatura aldono donus jare literaturaĵon en amplekso de 1664 paĝoj: tio estus jam diversaj dikaj volumoj!

Ni havas la plej bonan volon, la samideanoj **kunagu!**

La enhavo de la literatura aldono povos esti tre diversa; ĝi povos enhavi romanojn, dramojn, poemojn, mallongajn rakontojn, legendojn, fabelojn ktp. Komence ni publikigos, kiel ni jam sciigis, interesan verkon de la dana verkisto Blicher: „Taglibro de Vilaĝ-pedelo", laŭ bona traduko de s-ano Bulthuis, L. K.-ano. Tiu ĉi verko ampleksos supoze 3—4 foliojn (48—64 pĝ.) de la literatura aldono.

La prezo supoze estos po unu folio de la literatura aldono (16 paĝoj) la duona kiel po unu numero de ET.

Ĉiujn detalojn oni trovos en la jubilea numero.

Ĉiam per krajono
aŭ: Kiel akiri bonan stilon.

Kara s-o redaktoro!

Fine mi ektrovis, kion ni ĉiam serĉis. Forestas fine miaj duboj, fine lumo kaj heliĝo venis en mian spiriton. Mi ne povas priskribi mian ĝojon, ĉar nun revenis mia anima paco. Pro tio mi eĉ repaciĝis kun mia edzino, mi pardonis al ŝi ĉion, la pantoflan aferon, la noktan Esperanto-scenon. Ni ree amas nin reciproke kiel en la komenco de nia kunestado, kiam mi ankoraŭ „revis ĉe ŝia koro". Ho, kial ne pli frue mi eksciis tion, kial ne pli frue mi esploris la grandan sekreton! Kaj kiel simpla tio ja estas, tute simpla! Kiom da tempo, penado kaj mono mi estus ŝparinta! Koran, koregan dankon al vi, sinjoro, ĉar via gazeto montris al mi la ĝustan vojon.

Kiel? Vi ne scias, kion mi volas diri? Paciencon, sinjoro, paciencon, mi tuj klarigos la aferon.

Mi ofte legis — ankaŭ en via ĵurnalo —, ke estu la ĉefa celo en la Esperantomovado, eduki seriozajn kaj perfektajn Esperantistojn. Bone, sinjoro, tre bone! Sed kial oni ne montras al ni komencantoj la plej oportunan kaj la plej facilan vojon por atingi ĉi tiun celon? Kial oni retenas tiel singardeme la sekreton, kial oni kaŝas antaŭ ni la solan kaj simplan i l o n? Sed nun mi scias ĝin, sinjoro; tamen ĉi tio eble ne estas via merito, kvankam en la komenco de mia letero mi elparolis mian dankon; vi tamen ne rajtas fieriĝi pro tio, ĉar eble vi tute ne vidis aŭ legis en via gazeto la artikolon, pri kiu mi pli sube parolos.

Estis jam delonge mia aspiro fariĝi perfekta kaj bonstila Esperantisto. Mi intencis dediĉi miajn verkistajn kaj poetajn kapablojn al nia sankta afero. Sed kion utilas la plej bonaj kapabloj, se oni ne estras la lingvon kaj havas stilon kiel sepjara lernejinfano? Mi lernadis, mi studadis, mi penadis, mi klopodis — vane. En neniu lernolibro, en neniu legolibro, en neniu frazlibro, en neniu „gazeto por progresintoj" mi trovis uzeblan helpon. Grave, sinjoro, grave mi plendas pri tio.

„Estas klare," diris mia edzino, „ili certe ne deziras, ke ankaŭ aliaj homoj estu perfektuloj, ili solaj volas esti eminentuloj."

Nur unu fojon mi supozis esti trovinta la ĝuston.

„Kiel akiri bonan stilon? — Nepre necesa helplibreto por ĉiuj seriozaj Esperantistoj kaj por tiuj, kiuj volas fariĝi tiaj . . . " mi legis en la anoncparto de iu gazeto. „Jen, kion mi serĉas!" mi ekkriis ĝoje. Ĝenerale mi ja ne tre ŝatas tiajn libretojn, tro ofte mi estis seniluziigata. Ekzemple foje mi aĉetis verketon: „Kiel gajni en loterio?" Ĉu mi gajnis ion? Tute ne. Alifoje mi mendis libreton: „Kiel fariĝi parolisto?" Sed bedaŭrinde mi havis per ĝi nur malagrablajojn. Ĉiuokaze mi volis fari paroladojn, kaj preskaŭ ĉiam mi tro longe serĉadis en la libreto konvenan parolmodelon aŭ elektis nekonvenan, tiel ke oni indigne forpelis min de la tribuno, ne malofte per pli aŭ malpli sentebla uzado de la manoj. Sed ĉe mia edzino, sinjoro, vi povas admiri la parolkapablon, aŭskultante ŝiajn primoralajn kontraŭ mi direktatajn predikojn, faratajn sen iu libreto, sen iu ajn preparado. La samon mi spertis pri jeno: „Kiel fariĝi energia?" Antaŭ ol mi estis elpoŝiginta la libreton dum la geedzaj disputoj, por ĝin konsulti, jam ĉio estis okazinta, jam delonge ŝiaj delikataj virinaj manetoj desegnis sur mia vizaĝo . . . . , sed tio ja estas mia afero, kaj mi preferus ne paroli pri la „energio" de mia edzino.

Nu, koncerne la „bonstiligan" libreton mi atendis pli bonan ŝancon. Bedaŭrindege mi ree estis trompata. Restis mia stilo tiel mallerta kiel antaŭe, kaj pri lingva perfektiĝo mi ĉesis revi. Tute senkuraĝigite mi nun jetis la tutan Esperantaĵon en la fajron, unue la netaŭgan pristilan libreton, poste la lernolibrojn, la legolibrojn, la gazetojn, unu post la alia. Jen mi tenis en la mano la lastan ekzempleron de ET. Kun iomete da melankolio mi rigardis ĝin. Ĉu konservi ĝin kiel memoraĵon? Subite mia okulo ektrafis kelkajn vortojn: . . . bona stilo . . . certa sukceso . . . perfekta Esperantisto. Pli intense mi rigardis, efektive, artikolo pri perfektiĝo kaj akiro de bona stilo. Certe ĝis nun mi estis ĝin pretervidinta.

„Nu, ankaŭ ĉi tiun lastan metodon mi provos, por eviti postajn memriproĉojn." Tuj mi sidiĝis, komencis legi, legadis, kaj ĉe ĉiu vorto pliheliĝis mia spirito. Dank' al la verkinto, dank' al vi, sinjoro, ĉar vi presigis la artikolon! Jen mi havis la serĉatan informon, nun mi sciis, — plej klare kaj ne malkompreneble estis skribite eĉ kelkaloke: „ĉiam studado, ĉiam lernu . . . kun krajono en la mano, ĉiam uzu la krajonon!"

Ho mi simplulo, kion estis m i farinta ĝis nun? Mi ne plu miras, ke neniam mi sukcesis, ke mi ne ellernis la lingvon, ĉar mi ja estis forgesinta kaj forlasinta la ĉefaĵon. Ĉiam per krajono — kaj m i, sinjoro, mi uzadis ĝis nun nur . . . inkon. Inkon anstataŭ krajono! Por reteni en la memoro la nekonatajn vortojn, mi enskribis ilin en kajeron, sed nur per inko; la taskojn mi skribis ĉiam per inko, la tradukaĵojn nur per inko. Nun mi komprenas, pro kio vi malaprobis miajn poemojn kaj verkaĵojn, ĉar ili ja ankaŭ estis inkefaritaj.

Leginte la ĝojigajn liniojn, mi preskaŭ freneze dancis ĉirkaŭ la tablo kaj alvokis mian edzinon. Ŝi malfermegis buŝon kaj orelojn, malgraŭ sia parolemo ŝi pro mirego ne trovis vortojn, fine ŝi per fingro montris **al sia frunto: „Ho vi** trifoje stulta simplegulo!" Sian ĉapelon ŝi surkapigis kaj foriris.

„Kien vi iros?" mi demandis.

„Atendu!" ŝi nur diris.

Post kelkaj minutoj ŝi revenis kaj donis al mi tute novan, belan krajonon en briletanta latuna ingo. Ha, mi komprenis. Samtempe ŝi alportis la gazeton kun la nova traduktasko.

„Jen, traduku ĝin, sed . . . per la krajono!"

„Permesu, mia karulino, mi opinias, ke tio tute ne estas urĝanta."

„Silentu kaj traduku!"

Mi obeis. Kun zorgemo mi komencis pintigi la krajonon.

„Ha, kio estas tio, Eŭlalio? Tio ja nepre ne estas krajono, tio ja estas kopikrajono, kaj se mi . . . "

„Kopikrajono? Kompreneble kopikrajono! Ĉu vi imagas, ke mi ne scias tion? Ke mi ne tre intence aĉetis ĝin? Dum la aĉeto mi meditis: Oni ja ne konas la homojn; se vi skribos per simpla krajono, malica recenzisto povos eble forskrapi kelkajn vortojn kaj anstataŭigi ilin per netaŭgaj, por ke vi ne havu la premion."

„Vi certe estas prava. Sed uzante kopikrajonon mi ne laŭvorte plenumas la postulon: ‚ĉiam per krajono', ĉar kopikrajono — laŭ mia opinio — ne estas krajono."

„Kopikrajono ne estas krajono? Kio do? Eble ranvosto? Krajono estas krajono kaj ‚kopi-' estas nur prikvalita esprimo."

Kia estas via opinio, sinjoro? **Ĉu kopikrajono** estas krajono aŭ ne? Por **ne sennecese stimuli** la parolemon aŭ eĉ la „energion" **de mia kara** edzino, mi cedis.

Revenis post kelkaj tagoj mia tradukaĵo kaj — mi ne miris — nesukcesinte. Sed malgrandan **progreson** mi jam povis konstati: mi estis farinta

Sur vojo al koncentriga Literatura Agado.

La eldonitaj de Georgo Davidov „Titolaroj“ kaj la Katalogo de lia biblioteko evidentigas la tutan enhavon de la Esperanta literaturo. Ĉu ĝi prezentas grandan valoron? Ĉu prave Esperantistoj argumentas per ĝi en varbado de novaj adeptoj? Mia dekjara propaganda sperto kaj diskutoj kun ne-Esperantista publiko instigas min rigardi la aferon de iom alia vidpunkto. Kiam mi multfoje proponadis ekstudi Esperanton al personoj, kiuj intelekte laboras en iu fako, — kuracistoj, pedagogoj, inĝenieroj, socialistoj, studentoj, — mi ĉiam ricevis la saman demandon: „Kian utilon donos al mi Esperanto; ĉu mi trovos en tiu ĉi lingvo necesan por mi literaturon? En la rusa lingvo jam ekzistas ja rimarkindaj verkoj el aliaj lingvoj, la novaĵoj estas rapide tradukataj; cetere mi preferas ellerni anglan, francan aŭ germanan lingvon por disponigi al mi novan senliman literaturon kaj ricevi ĉiujn novaĵojn en tiuj ĉi lingvoj. Sed Esperanto por mi, kiun ne interesas propagando de via lingvo, restos nur sennecesa balasto.“ Mi aj rimarkoj, ke Esperanto posedas jam ĉefverkojn el diversnaciaj literaturoj, tute ilin ne kontentigis kaj elvokis kontraŭdiron: „Ni bezonas ne apartajn verkojn, sed la literaturon, kiu spegulas la progresojn de nia scienco aŭ arto.“ Ĉerte tiajn postulojn Esperanto ne povis kontentigi, kaj mia propagando havis fiaskon.

Mi konvinkiĝis, ke Esperanto estas necesa kaj interesa nur por Esperantistoj mem, t. e. personoj, kiuj la tutan celon kaj sencon de sia vivo trovas en disvastigo de la lingvo, kaptante en sian reton similajn individuojn, kaj la cetera mondo, kreanta la vivon kaj ĝiajn movadojn, restas indiferenta por Esperanto, en plej bona okazo platone aprobante nian movadon pro ĝia fincela idealo. Interne mi konsentis kun la diritaj kontraŭ-argumentoj, kaj maldolĉon mi sentis pro la centoj da tute senvaloraj libraĉoj, kiuj ŝarĝis la bredojn en la Saratova Esp. Biblioteko. Kiel senfrukte kaj neracie estis foruzitaj multaj fortoj! Se tiuj samaj fortoj kuniĝus por traduko de kelkaj gravegaj verkoj sciencaj aŭ literaturaj, la efiko rezultus pli signifa. Vere skribas Lebren en sia broŝuro „Militarismo“, ke li scias nur unu gravan verkon en Esperanto: La Evangelion. Oni povas aldoni ankoraŭ: La Biblion. Jen estas pli-malpli tutfinitaj laborajoj, kiuj havas sur si la sigelon de celkonscia deziro. Ĉio cetera en Esperanta literaturo estas hazarda, fragmenta, sensistema kaj, plejparte, absolute ne impresiga.

La nuna revigliĝinta Esperanta movado pasas sub la signo de **seriozeco.** Ni kvazaŭ maturiĝis, ni kapablas jam taksi nian sperton kaj ĝin bone utiligi. Ni penetrigu tiun ĉi **seriozecon** en ĉiujn fakojn de nia laboro. Ankaŭ en la literaturan movadon. En ĉiu lando troviĝas dekoj da personoj, kiuj dediĉas sian tempon al tradukado en Esperanton. Do tiuj ĉi personoj interkonsentu, kiujn verkojn, gravajn kaj valorajn, estas necese traduki en Esperanton, kaj ilin oni traduku, ne malŝparante sian tempon por bagateloj. La tuta Esperanta mondo estos danka al ili, kiel ĝi estas danka al A. Grabowski por lia traduko de „Sinjoro Tadeo“. Estas dezirinde formi nacilingvajn sekciojn de Esp. Lit. Asocio, kiuj seninterrompe gvidu kaj reguligu la laboron, kiel tion, ĉiam pli sukcese, faras la Rusa Sekcio de E. L A. Ĝi efektivigas tradukadon de plenaj verkoj de A. Puŝkin kaj L. Tolstoj. Per insista konvinkado ĝi deflankigas siajn membrojn de hazardaj tradukoj, kunigante la fortojn por plenumo de la starigitaj taskoj. Ĉu oni ne povas agi sammaniere en aliaj landoj? Ĉu la saman metodon oni ne povas apliki por tradukado de sciencaj verkoj? Mi memoras, ke iam oni proponis entrepreni tradukadon de la tutmonda fabeltrezoro. Nun renkontiĝas konsiloj traduki iujn gravajn verkojn, oni nur 7 lingvajn kaj eĉ nur 2 ortografiajn malkorektajojn.

„Nu, ĉi tiun fojon mi jesas, ke vi estas prava,“ konfesis mia edzino, „do uzu de nun simplan krajonon. Tamen mi konsilas al vi, ne plu faru nur tradukaĵojn, ŝatu vin tro altspirita por tio. Verku belan poemon kaj sendu ĝin al ‚Esperanto Triumfonta‘!“

Tuj mi komencis. Kaj mi estas certa, ke mi verkis bonan, belan kaj tre taŭgan poemon, en kiu vi trovos nenion riproĉindan aŭ malaprobindan. Mi certigas vin, ke de la komenco ĝis la fino ĝi estas skribita per krajono, per simpla, nigra krajono, kaj pro tio plenumas ĉiujn postulojn de bonstila verko.

Jen mia poemo:

La paska leporo.

Iras sur la strat' la homoj,
Sidas en la ĉambr' l' onklin,
En l' arbar' min kisas amatino,
Ve, tion vidas paska leporin'.
Ĝi tuj vilaĝon en la ĉambron
Al la onklino kuras for,
Kaj nun al ĉiuj tion *ŝi* rakontos.
Ho vi malica paska filepor'!

Sed nepre ne forgesu, sinjoro, sube enpresi:

Originale verkis
Kristiano Mallerta (kun 2 l),

kiu tre afable vin salutas.

La malbona Ekzemplo.

De *D-ro Joh. Ev. Schweiker.*

Altestimata redaktoro!

Vi certe memoras pri la al vi direktita letero de malfeliĉa Kristiano Mallerta en n-o 88 de via ŝatata „Esperanto Triumfonta“.

turnas sin al naciaj Esperantaj organizaĵoj kun propono kunmeti listojn de tradukindaj verkoj. Tio estas, certe, sekvindaj metodoj.

Tamen devas ekzisti la kriterio (distingilo) por elektado de tiuj aŭ aliaj verkoj. Mi proponas elekti unu-du klasikajn verkarojn de sia literaturo kaj ilin dividi inter tradukantoj. Per unuigitaj fortoj tradukado rapide progresos kaj la Esperanta literaturo povos baldaŭ pliriĉiĝi je kelkaj klasikaj verkaroj de la tutmonda literaturo. Samtempe oni devas Esperantigi la plej aktualajn verkojn, kiuj impresas la modernan socion, kiuj pensigas kaj paroligas la publikon. Se ni sukcesos prezenti la tradukojn pli rapide ol la ceterlingvaj tradukistoj, ni gajnos per niaj tradukoj plian atenton. Samon oni apliku al scienca literaturo. Nur per praktikado de tiu ĉi metodo kreiĝos firma bazo por evoluo de originala literaturo. Ni larĝe malfermu aperturojn por la puraj, vivakvaj fontoj de la naciaj literaturoj, tiam la fontoj abunde nutros nian propran torenton de la tutmonda, supernacia, homaridea literaturo.

V. Polakov, Moskvo.

trovante en la nacia revuo sufiĉan materialon pri nia movado internacia, — la naci-gazetoj estas malamikoj de la internaciaj, forprenante de ili grandan nombron da abonantoj kaj tiamaniere malfaciligante ilian vivon.

Jen la formalaj malutilaj de la naciaj gazetoj. Je la morala vidpunkto la naci-Esperantista revuo, grupante ĉirkaŭ siaj paĝoj precipe tiujn el niaj partianoj, kiuj, jam abonante unu gazeton, ne grupiĝos ĉirkaŭ alia internacia organo — vole ne vole malfortigas la senton de internacieco, kiu devus en niaj vicoj esti tre forta.

La ne-Esperantista publiko nevolonte malfermas la specialan Esperanto-organon, eĉ se ĝi enpresas la nacilingvajn artikolojn: la amikoj de Esperanto jam ne estas por la propagando interesataj, la malamikoj ne emas legi ion pri Esperanto; ilia opinio ja estas jam tute firmigita, kaj propravole neniam ili legos ion favoran por la internacia lingvo. —

Per la naci-Esperantaj gazetoj nia movado ĉirkaŭiĝas per la ĥina muro kaj tute malproksimiĝas de la ne-Esperantista mondo, samtempe ĝi



„Amovan“-aŭtomobil-ekskurso de nederlandaj ges-anoj el Hago al „De Kieviet“ (16. 7. 22.).

Kontraŭ la nacia Esp. gazetaro.

Dum la dua ĝenerala labora kunsido de la I-a Tutpola Esperantista Kongreso la 5. junio 1922 mi paroladis pri la projektoj koncernantaj la gazetaran Esperantistan agadon en Polio. La kongreso pro manko de tempo ne povis pridiskuti la esprimitajn ideojn. La projekto estis transdonita al la Komitato de la Pola Esperantista Federacio. Supozante tamen, ke la pensoj de la referato ŝajnas tre gravaj por nia propagando, mi opinias, ke estas mia devo diskonigi la projekton al la tutmonda Esperantistaro.

En la nuna stato de nia movado la nacia Esp. gazetaro estas danĝera por la propagando. Kiu legadas la naci-Esperantajn gazetojn? Nur la jam konvinkitaj Esperantistoj! Ni analizu la enhavon de iu „Franca“ aŭ „Germana Esperantisto“: La nacilingvaj propagandaj artikoloj estas tute nenecesaj por la jamaj Esperantistoj, kaj ĉar la revuojn nur legas la Esperantistoj — tiuj ĉi artikoloj estas tute perditaj por la afero. Se la nacia revuo publikigas la tradukon de nacia literaturo, ĝi precipe estas legata per la publiko, kiu povus legi la originalon de la tradukitajo, ĉar la eksterlanda publiko malofte legas la naci-Esperantan gazeton de fremda lando. Same fariĝas neutilaj la artikoloj pri la historio, geografio kaj la stato de la nacio kaj lando, kiu publikigas la gazeton. Krome, ĉar la vasta Esperantista publiko en tiu lando, kie publikiĝas nacia gazeto, nur legadas ĉi tiun kaj malofte abonas la internaciajn organojn, ne devenas internacia, sed dispeciĝas laŭ naciaj centroj. —

Kiamaniere kontraŭstari tiun ĉi situacion? Ĉesigi tuj la publikigon de la naciaj Esperanto-revuoj kaj anstataŭigi ilin per la jena sistemo:

La redakciaj komitatoj de la naciaj revuoj transformiĝas en la naciajn gazetarajn komitatojn; la administrejoj de la gazetoj teknike helpos la gazetarajn komitatojn en la plenumo de iliaj devoj. En la landoj, kie mankas la naci-Esperantaj gazetoj, devas esti formotaj la gazetaraj komitatoj.

Kion devas fari la naci-Esperantaj gazetaraj komitatoj?

1. periode publikigi la jenajn eldonojn:
   a) nacilingvajn propagandajn foliojn aŭ broŝuretojn, se eble, ilustritajn, aldonotajn, se eble, al la naciaj ne-Esperantistaj revuoj aŭ gazetoj kaj dissendotajn al la institucioj kaj profesiuloj, kiuj povas meti la eldonaĵojn al la publika trarigardo (bibliotekoj, kuracistoj ktp. por meti en atendejojn),
   b) nacilingvajn bultenojn, tiamaniere publikigatajn, por ke ili povu esti sensanĝe pretigataj en la ne-Esperantistaj gazetoj aŭ revuoj:
      α) por la ĉiutaga nacia gazetaro,
      β) por la speciala nacia perioda gazetaro,
   c) Esperantlingvajn foliojn aŭ broŝuretojn kun artikoloj pri la propra aŭ alia lando aŭ nacio, aldonotajn, se eble, al la internaciaj Esperantaj gazetoj, se eble ilustritajn,
   d) Esperantlingvajn bultenojn kun informoj pri la nacia Esperantista movado, dissendotajn al la Esperantistaj gazetoj kaj institucioj,
   e) bultenojn kun informoj, sciigoj kaj kronikoj koncernantajn la internan Esperantistan vivon en la lando kaj dissendotajn al la membroj de Esperantistaj societoj ktp.

2. prizorgi la publikigadon en naciaj kaj Esp. gazetoj de diversaj artikoloj: en naciaj gazetoj Esperant-propagandaj artikoloj, en Esperantaj gazetoj popularaj, senpartiaj artikoloj pri la lando aŭ nacio de la komitato. La komitatoj povas vere fariĝi la naciaj filioj de la redakcioj kaj administracioj de la internaciaj Esperantistaj revuoj kaj ankaŭ la presaj oficejoj por propagando de Esp. —

Mi devas atentigi, ke la proponata sistemo tute ne malebligas la povon aboni ĉiujn tiujn suprecititajn eldonaĵojn, kiuj povas surhavi sinsekvajn numerojn kaj similan aspekton.

En la landoj, kie mankas ankoraŭ Esperantistaj gazetoj ĉu pro manko de necesa kapitalo, ĉu pro manko de indaj redaktantoj, la supra sistemo ebligos de tempo al tempo ion eldoni aŭ enpresi por akceli la propagandon.

Ĉi tiu projekto, se ĝi eniros en la vivon, ne nur grande plifortigos la internacian Esperantlingvan gazetaron, sed ankaŭ ĝi, liberigante certan nombron de la plej lertaj Esperantistoj de la laboro kunigita kun la eldonado de gazeto, — permesos al ili pli utile propagandi niajn lingvon kaj aferon.

Mi ĵetas tiun ĉi projekton en la mondon, por ke la tutmonda Esperantistaro ĝin pridiskutu kaj, se oni konvinkiĝos, ke ĝi estas utila kaj bona, ĝi estu akceptata por la bono de nia afero.

Warszawa, 12. julio 1922.

Józef Litauer,
subprokuroro de la Varsovia Tribunalo.

Legolibra febro.

En ET s-o Jung skribis pri la gazetfonda febro, kiu infektis multajn samideanojn. Nun oni povas paroli ankaŭ pri legolibra febro, kiu infektis la eldonistojn Esperantistajn. La nombro de krestomatioj, internaciaj, unuaj kaj duaj legolibroj bonaj aŭ malbonaj estas nekalkulebla kaj ankoraŭ pli multaj aperas.

Pro la multaj novaj legolibroj oni forgesas la malnovajn. Tre bona legolibro ekzistas, ĝi estas unu el la plej malnovaj libroj Esperantaj, sed ĝi ĉiam estas aktuala, ĝia enhavo interesa kaj ĝia stilo modela. Mi ĝin varme rekomendas al ĉiu samideano, komencanto aŭ perfektulo. La nomo de tiu ĉi valora libro nun flankenŝovita per la amaso da novaĵoj estas: Fundamenta Krestomatio de D-ro L. L. Zamenhof.

Tiun krestomation ni rekomendu antaŭ ĉiuj aliaj, tiun libron niaj kursanoj legu, ĝin posedu ĉiu samideano kaj ĝin studu ni ĉiuj.

La aŭtoroj dediĉu sian tempon kaj siajn fortojn al alia laboro pli fruktodona por nia movado. Ni kun bedaŭro vidas, ke multaj samideanoj forlasas niajn vicojn, ofte la plej valoraj anoj laciĝas kaj perdas sian intereson. Kial? Eble pro tio, ke ili ne trovas konvenan nutraĵon; ilin tedas tiuj ĉi legolibroj kaj aliaj infanaĵoj; ili ne havas emon sian tempon dediĉi al legado de fabeloj kaj rakontoj konataj el la infaneco; ilin ankaŭ ne povas kontentigi la miksaĵoj, kiujn enhavas niaj Esperantaj gazetoj.

Ni nepre bezonas valoran literaturon, tradukaĵojn aŭ originalaĵojn de diversaj specoj. La pedagogo, inĝeniero, komercisto, turisto, kiuj lernas nian lingvon, volas per ĝi atingi ion, kion ili ne povas atingi per sia gepatra lingvo. Se ili trovas en Esperanto verkojn aŭ gazetojn por ili laŭ faka vidpunkto valoraj kaj interesaj, ili certe ne forlasos Esperanton, sed ili allogos ankaŭ kolegojn. Tial estus dezirinde, ke anstataŭ la multaj legolibroj naskiĝus pli valoraj literaturaĵoj. Pli bone estas unu utila libro ol dek neutilaj. Oni povas ankaŭ diri, ke pli valoras por Esperanta biblioteko unu granda libro ol dek

Kiam mi legis tiun ĉi artikolon, mia ventro skuiĝis; tiel mi ridis. Ĉu vi ankaŭ? Kompreneble.

Dum mi do legadis kaj ridadis, min observis mia mastrumistino kaj demandis pri la kaŭzo de mia gajeco.

Mi tradukante raportis al ŝi sincere kaj sensuspekte. Ho ve! Ke mi do estu estinta singarda! Ĉar mia mastrumistino rakontis ĉion al la edzino de mia frato kaj — nu bonvolu mem legi, kion mia frato skribis al mi:

„Vi ja scias, kara frato, ke mi havas — ne! havis laboreman kaj paceman edzinon. Tio aliiĝis, de kiam ŝi eksciis pri la enhavo de la letero de certa Kristiano Mallerta. Unue mia edzino postulis de mi, ke mi aĉetu al ŝi kvar Esperantajn gramatikojn kaj kvin Esperantajn legolibrojn; ĉar ŝi volis ankaŭ lerni Esperanton same kiel la edzino de Kristiano Mallerta. Mi obeis, devis obei. Nun ŝi lernas tage kaj nokte kaj faras nenion alian. Ĉu vi komprenas la gravecon de tiu ĉi frazo? Tial mi devas fari la ĉiutagajn mastrumajn aĉetojn, mi devas pretigi la tagmanĝon, mi devas gardi la infanojn kaj endormiluli la plej junan, mi devas balai la ĉambrojn kaj batpurigi la tapiŝojn, tutsame, kiel Kristiano Mallerta.

Due mia edzino imitas la ekzemplon de la edzino de nomita Kristiano Mallerta ankaŭ koncerne — la pantoflojn! Ho, mi silentu pro honto, kara frato. Kiomfoje mi aŭdas la kolerajn vortojn: ‚Kie estas mia pantoflo?‘ Kompatu min.

Via malfeliĉa frato
Aŭgusto.“

Kion diros vi, estimegata redaktoro, pri tiu ĉi malĝoliga afero, kaj kion la fama, eminenta Esperantisto kaj malfeliĉa edzo Kristiano Mallerta?

Via
sindonega *D-ro Schweiker.*

Realaĵoj.

Skizo de *Orrego Luco.*

Antaŭ nelonge, mi parolis kun bela amikino mia pri temo ĉiam parolinda por fraŭlinoj, pri la edzeco.

„Ĉu vi ne intencas edziĝi?“ ŝi diris al mi.

„Ho Julia! Al mi mankas por tio multaj necesaj kvalitoj, kaj mi posedas aliajn, kiuj malmankas.“

„Ne estu pesimisto.“

„Laŭ via kompreno ...“

„Ĉiam vi intencas resti ‚bovo malligita‘?“

„Bovo, ne; sed malligita, jes.“

„Kiel en ‚Donja Pančita‘.“

„Sed ni esploru la aferon iom pos iom. Kiamaniere vi komprenas la edzecon?“ mi demandis ŝin, akompanante mian demandon per unu el tiuj rigardoj, kiuj ŝajnas naivaj al simplanimuloj, diablaj al dibočuloj kaj simple scivolaj al ĉiuj aliaj, „kiamaniere vi komprenas la edzecon?“

Demandinte ŝin, mi pensis, ke Julia respondos al mi per unu el tiuj sentimentalaj konfuzaĵoj nun tiom ĝeneralaj: la edzeco estas la unuiĝo de du koroj sin amantaj reciproke, estas la efektiviĝo de revo, estas anĝelo kun orkoloraj flugiloj al ni murmuranta dolĉajn kaj ĉarmajn parolojn en niajn orelojn. La edzeco estas la leĝa sankcio de la amo. La amo estas la unuiĝo de du korpoj en unu animo; viro kaj virino fariĝintaj anĝeloj ktp., ktp., ktp.

Sed Julia mallevis la okulojn planken, rigardis la brilantajn pintojn de siaj ŝuetoj, levis la rigardon al la plafono, kaj tuj diris al mi per tiu moktono, kiun nur ŝi posedas:

„Johano, vi faris al mi demandon treete malfacilan ...“

„Tio signifas, ke mi konfidas al via talento.“

„Dankon ... Sed ĉu vi insistas scii, kio estas la ...“

„Kompreneble; mi deziras instrui min ...“

„Nu,“ diris Julia per triumfa tono, „la edzeco estas havi homon, kiu al ni faros ĉion, kion ni deziras.“

„Kio estas la samo,“ mi interrompis, „kvazaŭ oni postulus de violonisto, ke li gardu la muzikaĵojn, aŭ de generalo, ke li portu la leterojn al la poŝto ...“

„Silentu! Estaŝ malpermesataj la interrompoj,“ aldonis mia bela amikino, metante unu el siaj perlamotaj fingroj sur la buŝon en sintenado adorinda.

Julia malfaldis sian ventumilon kaj movetis ĝin dum kelkaj momentoj.

„La edzeco,“ ŝi diris, „estas grava instituclo, kiu posedas kiel bazon, kiel fundamentan ŝtonon, kiel scenejon de la okazaĵo, beletan dometon.“

„Brave! ... ‚Bis‘, ‚bis‘!“ mi ekkriis aplaŭdante per ambaŭ manoj, tiel forte, ke miaj gantoj preskaŭ krevis, kio igis min iomete moderigi mian entuziasmon. „Ni vidu la dometon.“

Julia faldis la ventumilon kaj prenis pozon de komika soleneco.

„Ni komencu per la origino.“

„De la loko de l' pordisto? Ne, dankon, ĉar eble ĝi havas malagrablan haladzon; ni komencu per la fino.“

„Vi estas malbone edukita,“ rimarkigis mia amikino, „bone oni sentas, ke vi ne estas persono el salono.“

„Komencu laŭplaĉe, kaj ni repaciĝu.“

„Mia saloneto estas mezampleksa, nek tiel granda, ke la personoj perdiĝos en ĝi, nek tiel malgranda, ke estos necese kroĉi la surtutojn en la vestiblo. La murojn kaj la plafonon oni pentros oleofarbe kun pala rozkoloro en la fundo kaj larĝa strio ĉirkaŭe.

Al mi plaĉas la turkaj lampoj kun arĝentumitaj filigranoj kaj havantaj vitron el ruĝa kristalo en la fundo, kie la lumo troviĝas. Nature, la

malgrandaj. Ni devas konfesi, ke la Esperantaj eldonaĵoj novaj estas nur kajeroj pli aŭ malpli malbonaj kaj malbelaspektaj. Se oni ne posedas kelkajn Esperantajn librojn eldonitajn antaŭ 10 ĝis 15 jaroj, ekz. La Rabistoj, Hamleto, La Faraono ktp., la montrado de Esperanto-biblioteko certe ne faras grandan efikon el propaganda vidpunkto.

Ni devas atentigi la malfortecojn de nia movado, por ke ĝi fariĝu forta. *Henning Halldor.*

Pri U.L.E.

Traleginte la statutprojekton de la „Universala Ligo Esperantista" en ET n-o 90, mi ne volas silenti pri mia opinio rilate kelkajn punktojn.

La nova projekto surprizas pro sia progresema formo, kiu supozas forte organizitan kaj grandegan (estontan) Esperantujon. Precipe la voĉdona elekto de la komitatanoj estas novmaniera, sed postulas ankaŭ plejan seriozecon kaj intimajn kunlaborojn kaj interrilatojn inter la diversaj nacioj, por ke ĉio laŭ programo kaj kun sukceso efektiviĝu.

Do aŭskultu:

Al IX.

Je la elekto de la delegitoj oni devas ankaŭ atenti la specialan karakteron de la diversnaciaj urboj. Laŭ neceso ĉiu nacia parto estu prezentata per propra delegito, kies reprezentataro (la nombro de la voĉoj) devas esti precize fiksata.

Al XII.

„Du Liganoj aŭ societo-membroj rajtas proponi kandidaton." Tiu frazo ne estas komprenebla. Ĉu ĉiuj Liganoj aŭ societo-membroj **po du** havas la rajton aŭ **nur du?** Tio estus aŭ tro multe, aŭ tro malmulte. Estas necesa klarigo pri tio. Laŭ mia opinio: „Ĉiu nacia (landa, faka) societo, laŭ postulo de ĝiaj suborganizoj, rajtas proponi po unu aŭ du kandidatoj, kaj la Ligo kolektas la nomojn en voĉdonliston, kiu ĝustatempe estu publikigata en la ‚Oficiala Gazeto'.

Al XIV.

Eksiĝo. [3]) **„Ĉiu ano pro malgloro** (de kia vidpunkto ‚malgloro'? ĉu ne malhonoro? Kiel tio estos difinata?) **ago kondamnita de iu leĝa juĝistaro al puno de malliberejo."** Ĉu ankaŭ de militistaraj juĝistaroj? Ĉu ne ankaŭ leĝaj juĝistaroj povas esti partiaj aŭ naciecaj? Tiu paragrafo estu alie formulata, por ke laŭ cirkonstancoj en politikaj kaj religiaj aferoj esceptoj estos allaseblaj.

Fritz Michalek.

Komerco.

Foiroj kaj Ekspozicioj okazontaj dum aŭgusto 1922.


1.—6. Malmö, Sved. Skånemässan.
2. aŭg. ĝis 5. okt. Paris. 20-a „Concours Lépine". Novaj eltrovaĵoj.
12.—20. Reichenberg, Ĉsl. 3-a Int. Spec. Foiro.
12.—31. Mechelen (Malines), Belg. Ekspozicio de Komerco kaj Industrio.
13. aŭg. ĝis 18. sept. Mechelen (Malines), Belg. Ekspozicio de Sonoril-Arto kaj Historio de la Sonorilaroj.
13.—18. Königsberg, Germ. 50-a Int. Spec. Foiro.
14.—22. Luksemburgo. Komerca Foiro.
15.—20. Königsberg, Teksa Foiro.
15. aŭg. ĝis 15. okt. Pretoria, Sudafriko. Nacia Ekspozicio de Fabrikaĵoj.
27. aŭg. ĝis 2. sept. Leipzig. Int. Aŭtuna Spec. Foiro.

Krome okazos dum aŭgusto Itala Naĝanta Foiro de Specimenoj vizitanta la urbojn Napoli, Tunis, Alger, Tanger, Lisboa, Barcelona, Marseille kaj Genova. Alia specimena foiro dum aŭgusto okazos en Laibach (Ljubljana), Jugoslavio.

La Foiro de Reichenberg, Ĉeĥoslovakio, disponigos standon por la propagando per kaj por Esperanto dum la III-a Internacia Foiro de Reichenberg (12.—20. aŭgusto). Esperantistoj deĵoros en la Esp. oficejo apud la stacidomo kaj en la propaganda stando. La foiro sendos oficialan delegiton al la Internacia Konferenco de Foiroj en Helsinki.

Propaganda vojaĝo de D-ro Fujisawa Genève—Cluj (Rumanio).

Eminentan gaston havis en la pasinta monato la Kluja Esperanto Klubo. S-o D-ro Fujisawa, membro de l' ĝenerala sekretariejo ĉe la Ligo de Nacioj, ĉefredaktanto de „Nova Tagiĝo" en Ĝenevo, vizitis Transsilvanion.



D-ro Fujisaŭa en Rumanio.
Meze: Fujisaŭa.
Dekstre kaj maldekstre: Giuglea kaj Morariu, sekretarioj.

En la ornamita reĝa atendejo de la Kluja stacidomo okazis solena akcepto. D-ro Meteŝ, prefekto, kaj D-ro Pop, urbestro, rumane kaj Morariu, klubsekretario, Esperante salutis la gaston. La akceptito kortuŝite respondis Esperantlingve kaj dankis pro la kora akcepto. Poste oni eniris la urbon per aŭtomobilo florokovrita, sur kiu flirtis verdaj flagoj.

Sabatvespere okazis festa kunveno en la Kluja Esp. klubejo. Dimanĉe vespere la urbo donis bankedon je la honoro de l' eminenta gasto. Rimarkinda estis la parolado de l' urbestro, kiu multe laŭdis la alproksimigan internacian fortan kaj interfratigan spiriton de Esperanto.

Elokvente parolis s-o pastro Ĉe. Por-Esperante parolis s-oj D-ro Renet, ataŝeo de l' Ĉsl. Respubliko, kaj Emilio Isac, verkisto, ĉefinspektoro de l' artoj. La rumana kaj hungara ĉeestantaro tre kompreneme konversaciis Esperante kaj multe tostis la japanan gaston, kiu promesis, ke pri la korega akcepto de rumanaj Esperantistoj li raportos ĉe la Ligo de Nacioj.

Lunde nia japana samideano vizitis la urbon, kaj marde D-ro Fujisawa kune kun multaj Klujaj Esperantistoj faris propagandan vojaĝon al Targo (Tg. Mureŝ). Tie s-o urbestro Harŝia kaj la tiea Esperantistaro akceptis la gaston. Al tagmanĝo festa la japana samideano kaj la Klujaj verdstelanoj estis invitataj al s-o Halász, estro de l' transsilvania Esp. Centro. Postagmeze en la Kulturpalaco, ornamita per verdaj flagoj, okazis bonsukcesinta publika propaganda kunveno. F-ino Zete salutis la gaston kaj transdonis bukedon de l' Targaj samideanoj. S-o Fujisawa faris belan paroladon pri Esperanta movado en Japanujo. Ĉe la honora vespermanĝo parolis D-ro Câmpian, s-o Ĉe, urbestro Harŝia, sekr. Morariu.

S-o Fujisawa faris grandefikan paroladon pri Ligo de Nacioj kaj pri Esperanto, kiu havas tre gravan rolon en la spirita interŝanĝado kaj reciproka kompreno de l' popoloj. Li bedaŭris, ke li ne povos partopreni la II-an Rumanlandan Esp. Kongreson pro oficiala okupoteco.

Alian tagon li reveturis tra Klujo kaj donis favorajn informojn al la en stacidomo kunveninta ĵurnalistaro rumana kaj hungara.

Li vizitis ankaŭ la Budapeŝtan grupon; ankaŭ en Vieno li faris spor-Esperantan publikan paroladon. Ni multe dankas al nia japana samideano pro lia bonsukcesinta propaganda vojaĝo.

Tramistaro.

Al ĉiuj delegitoj de UEA!

La Vienaj tramvojistoj sendis al la kongreso en Helsinki jenan leteron kaj petas precipe ankaŭ ĉiujn UEA-delegitojn je ilia kunhelpo en la intereso de la komuna Esperanto-movado:

Al ĉiuj partoprenantoj de nia XIV-a en Helsinki!

Nia „Tramvojista Unuiĝo Esperantista en Wien" salutas ĉiujn gekongresanojn korege kaj petas la tre estimatajn gesamideanojn, ke ili bonvolu helpi al ni ekzistigi viglan Esperanto-movadon ĉe la tramvojistoj de la **tuta** mondo. **Tio nur estas ebla kun via helpo.** Bonvolu igi, ke en kiel eble plej **ĉiu** urbo jam nun kelkaj tramvojistoj komencu lerni Esperanton, por ke en la jaro 1924 almenaŭ el ĉiu lando kelkaj tramvojistaj delegitoj povu veni al Wien, kie ni okaze de la XVI-a volas aranĝi ankaŭ kiel eble plej internacian tramvojistan Esperantistan fakkongreson, por fondi „Tutmondan Esperantistan Tramvojistan Unuiĝon". Por atingi la celon, ni jam nun devas komenci tre bone prepari la fondiĝon de „TETU".

Gill,
sekretario.

Rudolf Michael Frey, urboficisto, Esp. ĉefinstruanto ĉe la Vienaj tramvojlatoj.

Karl Wessely, konduktoro, prezidanto, Wien, XII., Steinhagegasse 3, II.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Esperanto en Ruslando.

En Moskvo okazis: la 16. 5. Lekcio en Akademio de Socia Edukado, kun ekspozicio de Esp. ĵurnaloj. — 23. 5. Lekcio en komunista universitato de malgrandaj nacioj. Kurso por 25 p. — 28 5. Raporto en muziklernejo de blinduloj. Kurso. — 29. 5. Raporto en moskva taĉmento de skoltoj. — 10. 6. Aperis Buleteno ruslingva de C. K. S. E. U. (Centra Komitato de Sovjetlanda Esp. Unuiĝo).

Novaj Esp. grupoj en Arkadak de Saratova gub., vilaĝo Vasiljevka de Vladimira gub., Kizel de Perma gub., vilaĝo Novaja Otrada de Caricina gub., Permj kaj Jurezanskij Zavod de Ufa gub.

Kurson por 30 gekomercistoj

de la plej granda magazeno „Kornblum" en Hagen, Germ., gvidas s-o ĉefred. Hartenfels.

„La Espero" ludita de sonorilaro.

En ET n-o 90 s-o Brabo opinias, ke verŝajne „La Espero" estis unuafoje ludita de sonorilaro dum la lasta belga Kongreso en St. Nikolaas. Estas tamen pli malnova fakto: en 1910 aŭ 1911 la Esp. Grupo de Condé (Nord) vizitis la grupon de St. Amand (Nord), Franc., kaj la ludisto de la tiea sonorilaro ludis nian himnon laŭ muzikaĵo kunportita de leŭtenanto Valentin Mannevy, fervora Esperantisto, kiu mortis en 1912 dum batalo en Maroko. Estis plezuro aŭdi nian himnon superportitan super urbon kaj vilaĝojn per la helaj sonoj de sonoriloj. *(R. R.)*

Nederlando.

La 16-an de julio la Nederlanda Esp. Unuiĝo „La Estonto Estas Nia" aranĝis festotagon en la ĉirkaŭaĵoj de Wassenaar apud Hago. Per aŭtomobiloj kaj biciklo proksimume 90 geesperantistoj partoprenis, inter kiuj kelkaj eksterlandanoj. Oni komune „piknikis" en la belegaj dunoj, promenis en la ĉirkaŭaĵoj kaj amuziĝis per gajaj ludoj. Multaj novaj samideanoj interkonatiĝis. Komuna tagmanĝo, en kiuj partoprenis 60 personoj, malfermis la belan tagon.

Al ĉiuj delegitoj de la nuna Haga Konferenco

estas sendita cirkulero (en 7 lingvoj) diranta; *La* sola rimedo forigi ĉe internaciaj kongresoj la malhelpon de la multlingveco estas la uzado de Esperanto, la internacia lingvo. La raportisto pri la budĝeto de la „Ligo de Nacioj" sciigis, ke „la elspezoj de la Ligo povus, esti reduktataj al unu kvarono, se oni nur uzus unu solan lingvon".

Brazila Geografia Kongreso por Esperanto.

La 7-a Brazila Kongreso de Geografio, jus okazinta en Parahyba, aprobis unuvoĉe proponon, prezentitan de D-ro Simoens da Silva, reprezentanto de Brazila Ligo Esperantista, per kiu ĝi elmontras sian simpation al Esperanto kaj rekomendas ĝian uzadon en internaciaj kongresoj.

Al la Esperantistoj de Rejnlando! Vizitu Esp. Kongreson en Arnhem, Nederlando.

La 10. sept. okazos la II-a Orient-Nederlanda Esp. Kongreso en la bela urbo Arnhem, kie kunvenos samideanoj el la tuta orienta regiono de Nederlando. La kongresa komitato invitis germanan samideanon por fari paroladon kaj tre ŝatos, se ankaŭ aliaj germanaj Esperantistoj partoprenos la kongreson; de ili estos petata nur laŭforma kongrespago, nome du markoj (t. e. la antaŭmilita valoro de la nuna holanda guldeno), ĉar la holandaj kongresanoj pagos unu guldenon. La kongresa komitato ĝentile petas ensendi viajn eblajn aliĝojn antaŭ la 27. aŭgusto por plifaciligi la preparojn. Tiam tuj sekvos aisendo de programo, kongreskarto ktp. — Ni esperas, ke per ĉeesto de multaj germanaj amikoj la kongreso fariĝos pli internacia kaj tial pli efika.

Kongresa adreso: O. N. E. K., Velperweg 52, Arnhem, Nederlando.

Por malsatantaj rusoj

ni ankoraŭ ricevis sekvantajn donacojn:

Paul Glöckner, Freiberg 50 gmk. — Grupo Horst-Emscher 80 gmk. — Dudas, Ivanovits, Gyüjtö, Vidovecz, Amiko kaj Brachmann en Orsova 295 gmk. — K. en Wien 500 aŭstr. kr. — Dr. Schweikert, Marktbibart 50 gmk. — Dr. Göhl (Esp. Soc.) Neugersdorf 75 gmk.

Alvoko de Germ. Esp. Instruistaro.

Kvar germanaj knabinoj pere de Asocio de Germ. Instruistoj Esp. fine de 1921 vojaĝis eksterlanden. Jam kelkfoje germanaj malriĉaj knabinoj estis kore akceptataj de bonkoraj Esperantistoj en diversaj landoj, kiuj tiel pruvis veran samideanecon. Dankon al ili! Sed la kvar knabinoj ne trovis la hejmon esperitan kaj sentas fortan nostalgion. La gepatroj estas malriĉaj. La vojaĝo estas longa. La Asocio petas noblanimajn en- kaj eksterlandajn Esperantistojn kaj Esp. ligojn oferi iom da mono por la infanoj. Malmultaj dolaroj, frankoj, kronoj ebligos la revojaĝon de la infanoj. Gepatroj kaj infanoj tiel konvinkiĝus pri la solidareco de la Esperantistoj, kaj la As. de Germ. Instr. Esp. kun pli granda sukceso ol ĝis nun povus labori por la interpaciĝo kaj interfratiĝo de la homaro. Monsendojn oni adresu al la prezidanto de la Asocio s-o Arthur Sohrmann, Kronprinzenstr. 5, Weinböhla-Dresden, Germanlando.

Gazetaro.

L'Intransigeant, Paris, 22. 7. Enhavas ĉefartikolon „Chimères . . . l'espoir en Esperanto", kiu pritraktas la kontraŭ-Esperantan cirkuleron de instruministro Léon Bérard. — La aŭtoro opinias, ke la franca lingvo devas resti la helplingvo de ĉiuj popoloj (ĉu ĝi estis?). Li konsilas fondi ligon por kutimigi la francajn civitanojn interparoli pri Esperanto „ne jetante glasojn kaj telerojn al la kapoj unu de la alia".

Dziennik Tczewski, Tczew, Pol., 5. 7. (Pri Esp. Kongreso Danzig.)

Volkszeitung, Bromberg, 21. 7. (Mondlingva angulo.)

Bremer Nachrichten, 21. 7. (Art. pri uzo de Esperanto ĉe „Malaltgermana Semajno".)

Twentsch Dagblad Tubantia en Hengelosche Courant, Enschede, Nederl., 17. 7. (Decido de albana registaro pri enkonduko de Esperanto.)

Volontà, fervojista revuo, Torino, majo. (Art. „La lingva Babelo" de Fra Olmo.)

Recenzejo.

Al est. S-o G. Ajul.

Por kompletigi vian recenzon en ET n-o 92 (Fundamento van Esperanto) mi sciigas vin, ke ekzistas jam depost 10 jaroj aŭ s l o v a k a eldono de Fundamento de Esperanto, eldonita antaŭ la milito (en 1912?) ĉe: Knihtlačiarsky spolok (libropresiga societo) en tiama Supra Hungarujo, nuna Slovakujo: Turčiansky Sv. Martin.

Estimplene
Emilo Wanitsek, Bratislava (Pressburg).

LIBROJ.

TRA LA MONDO. Internacia legolibro. Kolektita kaj prilaborita de Paul Bennemann. II-a parto: Por progresintoj. Kun aldono de 4 komponajoj. 15 : 22 cm. 144 pg. Eldonejo: Ferd. Hirt & Sohn, Leipzig, Esperanto-Fako. Prezo bone kartonite 70 gmk. (Por bonvalutaj landoj 140 gmk.)

Antaŭ kelkaj monatoj mi priparolis la I-an parton de „Tra la mondo" en ĉi tiu gazeto. Nun la aŭtoro kaj kompilinto donis al ni la II-an parton, veran juvelujon. Laŭdi ĝin supermezure signifus malgrandigi ĝian valoron. Similante krestomation internacian la libro abundas je la plej diversspecaj legaĵoj el vivo, arto, scienco, mondliteraturo (ekz. eĉ Rabindranath Tagore, Gustav Meyrink, Nikolaas Beets k. a.), historio ktp. — Riĉega trezorejo juvelaron enhavanta malfermiĝas antaŭ la okuloj de la leganto. Multaj temoj en ĝi incitas kaj instigas al vigla diskutado. Jen, kion la verkinto volas. La libro estu uzata en kursoj, kluboj kaj grupoj, ĝi paroligos vin nian lingvon, ekzercos vin en la buŝa uzado de l' idiomo Zamenhofa kaj internacio tutmonda. — „Tra la mondo" servos ĉiujn, ĉar ĝi estas verkita nur Esperante; bonega bindo malhelpos tro fruan eluziĝon, zorgeme farita preso plaĉas same bone. La aldonitaj komponaĵoj ĝoligos niajn kantemul(in)ojn. — Mi ripetas mian gratulon plene merititan de l' aŭtoro kaj de l' eldonisto. Flugu nun ambaŭ partoj formantaj kompletan tutaĵon trans montojn, marojn kaj limojn! *(G. Ajul.)*

VERSAJARO. Originale Esperante verkita de Julio Mangada Rosenörn. $10^1/_2 : 14^1/_2$ cm. 27 pg. Presejo San Lucas, 5, Madrid. Prezo: 1 respondkupono.

El la Lucas'a presejo eliris jam kelkaj kajeretoj Esperantaj. La nuna enhavas originalajn versaĵojn de l' fervora hispana pioniro Rosenörn, kies granda entuziasmo por nia afero estas bonkonata. — En liaj versoj flustras la delikateco de sentema animo kaj vibras la sango de pasia sudlandano. Li scias pentri per orkoloraj farboj kaj ritmigi romancojn kvazaŭ trubaduro mezepoka. Nordlandanoj eble ne tute komprenos la spiriton, kiu nekatenite trablovas la rimojn. — La aŭtoro promesas daŭrigon de la apero de broŝuroj, kies nebinditeco ebligos poste la formadon de bela volumo. — Por abonantoj de „Hispana Esperantisto" la broŝuro estas senpaga. *G. Ajul.*

GAZETOJ.

Litova Stelo. Julio.
Marto. Julio.
Le Monde Espérantiste. Majo-junio.
Novaj tempoj. Julio-sept.
Berliner Esperanto-Mitteilungen. Julio.
La Verda Ombro. Majo.
Kosmoglott. Julio.

AFIŜOJ, PROPAGANDILOJ, ktp.

SALUS (Saneca Abstinenca Longviva Universala Societo) Klarigaj cirkuleroj en la lingvo Esperanto. Haveblaj de Salus, Roma, Ital., Via Collina 24.

Poŝtkarto kun kanto „Vivu la Verda Stel'!" dediĉita al la XIV-a Kongreso. De Salo Grenkamp-Kornfeld, Jaslo, Pollando.

planko estos pargeta kun smirna tapiŝo kovranta la mezon. En unu el la anguloj palmeto, kaj en la alia sikomoro kun brančaro delikata kaj eterne verda. Sur la muroj estos speguloj reflektantaj kaj multobliganta] niajn figurojn, tiel, ke ni estos multaj kaj samtempe nur du."

„Kaj se la bopatrino venas?"

„Nur la homoj priatentas la bopatrinon."

„Vi estas prava," mi ekkriis plena je profunda rezignacio, „kaj antaŭtempa, ĉar mi ankoraŭ ne edziĝis definitive."

„Mi serĉos malaltajn sofetojn, meblojn, interplektitajn seĝojn kaj rubinkolorajn kurtenojn; mi aĉetos tiajn sofojn, sur kiuj oni profundiĝas dormetema pro la varmeta kaj delikata aero dum la noktoj de l' vintro. En tiuj agrablaj momentoj oni koncentrigas la tutan vivon al sia propra salono, al la lumoj reflektataj de la altaj speguloj, al la libro duone malfermita, kiun oni legas malrapide, revante; oni rigardas seninterese la statuetojn kun strangaj figuroj kaj kelkfoje . . ."

„Sian propran edzon."

„Murmuremulo," al mi diris la junulino. „Ĉu vi opinias, ke mi intencas edziniĝi kun vi?"

„Ne, mi ne opinias, ke vi havos tiel malbonan guston, Julia . . . Sed daŭrigu!"

„Nun mi pasas al mia manĝoĉambro."

„Vi agas malbone, amikino, ĉar en la dudeka jarcento oni komencas per tio — —."

Mi ne memoras la reston de la interparolado, kiun mi havis tiun vesperon kun Julia, kaj volonte mi scius, kion mi rakontis, ĉar post kunesto kun certaj virinoj, oni memoras nur iliajn okulojn, kiam estas pasintaj kelkaj tagoj. Mi nur povas certigi, ke forpasis monato, dum kiu ni ne vidis unu la alian, kiam mi ricevis la sciigon pri la edziniĝo, kiun sendis al mi Julia. Ŝi edziniĝis en Valparaiso.

Antaŭhieraŭ mi iris al la haveno pro urĝaj negocoj, kaj mi havis la plezuron vidi ŝin. Oni igis min atendi.

Dum ŝi alvenis, mi rigardis la salonon, kaj mi ne povis haltigi rideton, vidante ĝin tiel malsimilan ol ŝi revis ĝin.

„Kiel vi fartas, Julia?" mi salutis vidante ŝin eniranta.

„Ĉu vi longe min atendis?"

„Ho, ne! Mi estas uzinta mian tempon rigardante la ‚terakotaĵojn' kaj la kurtenojn kaj la speguloj n kaj la farbon rozkoloran." Nenio el tio estis en la salono.

„Ha, ha! Vi estas prava," ekkriis la juna edzino, ridetante malkaŝe. „Mi havas nenion el tio, ĉar ĝi estas tro multekosta, kaj ‚ni ne estas riĉaj'. La murpapero de tiu ĉi loko estas blua, ĉar ĝi estas multe pli malkara; unu peso*) po rulaĵo. Pri la speguloj kaj la glasoj el Japanujo . . ."

„Kiom malsimilas la realeco al tio, kion oni revis."

„Tia estas la vivo," aldonis Julia, „sed tamen, se oni amas, ĝi estas tre dolĉa," ŝi diris al mi ridetante.

El hispana lingvo tradukis
José Salazar.

Humoro.

Senkulpigo.

Burĝo estis malkontenta pri la decidoj de la vilaĝa konsilantaro kaj indigne diris: „La duono el la konsilantaro estas azenoj." Devigite tion repreni, li faris tion jenforme: „Mi bedaŭras mian riproĉon kaj deklaras, ke la duono el la konsilantaro n e estas azenoj."

*) Peso = sudamerika monero el arĝento, valoranta kvin pezetojn.

Ruslanda Esperanta Komerc-Oficejo „Espero“ en Moskvo

Miasnitckaja, 14. Poŝtkesto n-o 680.

Tradukas cirkulerojn, komercajn leterojn ktp. kaj sin ŝarĝas per la dissendo de cirkuleroj ktp. :: Prokuras komercajn adresojn. :: Eldonante internacian adresaron :: :: :: :: komercan, ĝi petas sendi al ĝi katalogojn ktp. :: :: ::

Fondinto **ALEKS. PRAGER**, Prezidanto
de Komerca kaj Industria Komitato de Centra Regiono en Moskvo.

Ni serĉas

perfektan Esperantiston

por redaktado, administrado kaj korespondado (eventuale perfektan Esperantistinon, spertan fidindan kontoristinon por administrado kaj korespondado). Nacio indiferenta. — Detalajn manskribitajn proponojn petas „Esperanto Triumfonta“, Horrem ĉe Köln, Germanlando.

Atentu!

Senpaga Reklamo
per la
Esperanto-Stando
ĉe la
Foiro de Reichenberg
(12.—20. aŭgusto 1922).

Eldonejoj, organizoj, firmoj,
kiuj deziras esti reprezentataj, sendu tuj sufiĉan Esperantan propagando-materialon por disdono.

Adreso: **Fritz Michalek, Reichenberg,**
Lerchenfeldstr. 20. Ĉehoslovakio.

KOLEKTANTOJ

de germ helpmono estu membroj de **Denob**
(Deutscher Notgeldsammler-Bund)
Adreso: **Leo Brieger, Breslau,**
Moritzstrasse 24.

Kostoj: pojare 12 gmk., por eksterlandanoj pojare 25 gmk.

Esperanto Service Corporation
„Esko“

500 Fifth Avenue New York City

Telegrafa adreso: Esperanto New-York.

Aĉeto, eksporto, importo kaj maklerado de ĉiuspecaj komercajoj.

Katalogoj, prezaroj kaj specimenoj estos danke ricevataj.

1922

III. Internacia Foiro de Reichenberg
Ĉehoslovakio
12.—20. augusto 1922

Plej granda teksaja merkato de la kontinento. Eksporta specimen-ekspozicio de bohemaj vitrajoj, ceramiko, Gablonzaj bijuterioj, maŝinmerkato, paperfoiro, teknikaj kaj kemiaj produktajoj. Metalaj, ledaj, lignaj komercajoj kaj ludiloj. Lokaj specialajoj.

Ĝenerala ekspozicio de komercajoj.

Rabatitaj veturprezoj. Faciligo por eniro en Ĉehoslovakion. Esperanto uzata.

Messeamt Reichenberg
(Esperanto-Fako) Ĉehoslovakio.

Sperta Komercisto
deziras agi kiel sola
Agento en Skotlando kaj Nordanglujo
por grava ne-teksa firmo aŭ eksport-sindikato de fabrikistoj. Plej bonaj rekomendoj donotaj, kaj se necese mongarantio povas esti donata.
Prefere oni deziras rilatojn kun firmo starigita antaŭ la milito, kiu jam posedis klientaron en Britlando.
Samideanoj bonvolu traduki tiun ĉi anoncon kaj sendi ĝin al gravaj firmoj en via distrikto! — Ofertojn peras la administracio de „Esperanto Triumfonta.“

Komence de aŭgusto aperos
la
4-a Eldono (1922-23)
de la tiel ŝatata
BES'a ADRESARO

La prezo estas: por Aŭstrio, Germ., Pol., Hung., Rus., Sib., Ukr., Est., Lit., Latv., Bulg., Jugosl. kaj Rum. 80 germanajn markojn afrankite, por ĉiuj aliaj landoj 150 gmk. afr.

Mendojn jam nun akceptas
Butin & Jung, Godesberg,
Germanlando.
Poŝtĉeka konto 92036 Köln.

S-o Jung en Horrem **ne** akceptas mendojn por nia firmo!!!

Elektra Fabrikejo kaj Eksportejo

en Sud-germanio serĉas diversnaciajn agajn kompanianojn, kiuj posedas unu (aŭ pli) mil svis. frankojn (teknikistoj, komercistoj kaj -inoj, laboristoj k. a.). Sameestas serĉataj kapablaj reprezentantoj ĉiulande. Faka kaj german-lingva kono ne estas necesa. Bonvolu skribi sub „Internacia kaj Komerca Societo“ 1922, München, Hauptpostlagernd, Germanlando.

Unua Tutpola Esperanto Kongreso.

Fotografaĵoj: 1. ĝenerala, 24 : 30 cm, prezo 2000 pmk.
2. ĝenerala, 18 : 24 cm, prezo 1500 pmk.

Havebla post alsendo de la mono ĉe
W. Miernicki, Warszawa, Marszałkowska 40.

Tra la Mondo

Internacia Legolibro.

La bonega dua parto (por progresintoj) jus aperis.

Prezo por malbonvalutuloj 70 gmk.
mezbonvalutuloj 112 gmk.
bonvalutuloj 140 gmk.

Por sendkostoj aldonu 10 gmk. (germanoj 4 mk.).

Havebla ĉe
Butin & Jung, Godesberg, Germ.

Mendu tuj antaŭ nova prezaltigo!

Nederlanda Anonima Societo
Luksa-pano Fabriko
antaŭe **Henri J. Carels.**
50 Butikoj:
Den Haag, Haarlem, Amsterdam.

Lunĉejo Carels
(ĉefo: H.A. Scharwächter)
63 Weimarstraat, Den Haag.
Oni parolas Esperanton.

Abonejoj de ET
en la landoj

Aŭstra: Ferd. P. Huber, Mönchsberg 5, Salzburg; por Wien „La Esperantisto“ (d-ro E. Pfeffer), Wien II/1, Postamt 54
Belga: Frans Schoofs, 45, Kl. Beerstraat, Antwerpen. Poŝtĉeka n-o 28420.
Bulgara: Georgi Ĥr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofia.
Ĉehoslovaka: Otto Sklenĉka, Hradec Králové. Otto Lumpe, Trautenau.
Estona: Est. Esp. Ühuiĝo, postkast 6, Tallinn.
Finna: O/Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.
Franca: Esp. Centra Librejo, 51 rue de Clichy, Paris 9.
Hispana: Konrado Doménech, Caldes de Malavella, prov. Girona, Vichy Catalan.
Hungara: Paŭlo Balkanyi, Hajos-utca 15-II-2, Budapest VI.
Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamaĉi, Aojama, Tokio.
Jugoslava: D-ro Dušan Maruzzi, Zagreb, Jezuitska ul., br. 1.
Litova: Paŭlo v. Medem, Smeliu g-ve 12, Kaunas (Kovno).
Nederlanda: J. Ravestein jr., v. Aerssenstraat 200, 's-Gravenhage. (Poŝĉeka konto Haag n-o 2578.)
Pola: Adolfo Oberrotman, Krak-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 5125). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1 a, Bydgoszcz-Bromberg.
Rumana: Esperanto-Oficejo Cluj.
Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1
U. Ŝ. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.

La malgranda glaciiga kaj malvarmiga maŝino

„ARKTIS“
estas fabrikaĵo de la firmo

JULIUS RÖMHELD, Mainz a. Rh. (Germanlando)
Ferfandejo, ferkonstruejo kaj maŝinfabriko.

Günter's Durchschreibebücher

Kopilibroj de Günter

por skribado kun ĉato aŭ krajono por ĉiuj celoj.
Eksporto al ĉiuj landoj.
Kapablaj reprezentantoj serĉataj.

Emil Günter,
Freiburg i. Br. (Germ.),
Schillerstr. 54.
Fabriko de kopilibroj.

Art-Amikoj,

Artaĵo-, Bildo- kaj Libro-Vendistoj,
kiuj havas interesoп por belegaj akvareloj, oleopentraĵo ktp. de eminentaj kaj konataj pentristoj aŭstriaj, turnu sin a
Sepp Osterer, Graz, Aŭstrio, Gleisdorfergasse 5.
Malaltaj prezoj.

Anoncetoj.

Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj anoncetoj (nur akceptataj por minimume du sinsekvaj enpresoj) kostas po du enpresoj kaj po 20 vortoj 0,20 dol., 0,50 hfl., 1 nord. kr., 1 šil., 1 svis. fk., 1 pes., 2 franc. aŭ belg. fk., 3 lir., 7 fmk., 8 kc., 40 gmk., 80 hung. kr., 400 pmk., 1200 aŭstr. kr., internacie 8 stamp. resp.-kup.; ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncetoj laŭdezire de la abonkonto, de aliaj ni enpresas anoncetojn nur post antaŭpago. — Anoncetoj devas alveni 10 tagojn antaŭ publikigo.

EDZIĜO. Prof. A. Lacalendola, del. de UEA en Bari (Italujo), edziĝis kun s-anino f-ino Teresina Neglia de Casamassima.

ESPERANTO EKSPOZICIO. Samtempe de ĉijara Hungarlanda Esp. Kongreso estas aranĝata granda Esp. Ekspozicio, por kiu bonvolu sendi ĉiuspecajn Esperantajojn. Laŭdezire la objektoj estos resendataj. Adreso: Hotelo Abbazia, Miskolcz, Hungario.

KOLEKTANTOJ! Okaze de IV-a Hungarlanda Esp. Kongreso aperis artaj glumarkoj, kiuj estas aĉeteblaj ĉe Loka Kongreso Komitato (Hotelo Abbazia, Miskolcz, Hungario) po 100 por unu svisa franko aŭ por samvaloro en aliaj valutoj.

RUSAJ SAMIDEANOJ. Kiu scias ion pri la nuna sorto de Bartok Lajos, hungara militkaptito, kiu laboris en apoteko en Ufa (Gospital N. 126), sed de 1918 nenion aŭdis pri li lia malfeliĉa patro. Bonvolu skribi al Györy Nagy, del. de UEA, Reményi u. 4, Miskolcz, Hungario.

KOMERCISTOJ KAJ INDUSTRIISTOJ ATENTU! — Oni intencas eldoni vastan gvidlibron tra Varsovio, kiu enhavos ankaŭ specialan parton kun komercaj reklamoj. Firmoj, kiuj volas reklami en la gvidlibro, estas petataj turni sin por ekscii detalojn al la Varsovia delegito de UEA, s-o Adolfo Oberrotman, Varsovio, Krak-Przedm. 10.

Mi NE kolektas poŝtkartojn; sed al ĉiu, kiu sendos al mi plenan serion da nuntempaj aŭ malnovaj poŝtmarkoj bonstataj el sia lando, mi adresos po unu bela artvidajkarto de Wien. Skribu vian adreson skribmaŝine aŭ skribmaŝinsimile al Martin Klein, Doebl. Hauptstr. 14, Wien XIX/1, Aŭstrio, Eŭropo. (Mi estas Esperanto-kursestro ĉe la Wiena policanaro.)

AL ESPERANTISTOJ KAJ NEESPERANTISTOJ en Persio, Hindio, Palestino, Ĉinio, Japanio, Aŭstralio, Transvalo, Maroko, Surinamo, Liberio, Kubo, Venezuelo, Meksiko, Urugvajo, Turkio kaj Brazilio estos sendataj 1000 miaj adresaroj (multaj eĉ al aliaj landoj!) de 500 japanaj interŝangistoj de poŝtmarkoj, poŝtkartoj ilustritaj, fotografaĵoj, plantoj, insektoj, moneroj, kuriozaĵoj ktp.

Via anonceto povas aperi en anoncparto de adresaro, se vi promesos respondi tuj ĉiun ricevitan sendaĵon je via anonceto. En via anonceto rimarku, kun kiuj landoj vi ne deziras rilatojn, kaj ĉu vi deziras rilatojn kun neesperantistoj. Ne ŝparu vortojn! Nacilingvaj anoncetoj akceptataj.

Anoncetoj kostas: ĉiuj 20 vortoj kč. 4.— (= du respondkuponoj aŭ —.40 svisfranko).

Ĝis 30. 9. 1922 devos ĉiuj anoncetoj esti ĉe mi.

SENPAGE ricevos ĉiu anoncanto mian adresaron. Mi jam havas anoncetojn por ĝi el Kubo, Dominiko, Venezuelo, Grekio, Meksiko ktp.

Aldonu respond-poŝtmarkon je ĉiu demando de mi! Mi malakceptos anoncetojn, por kiuj ne restos spaco. Tial sendu baldaŭ!

Mi ankaŭ vendas BES-adresarojn de Esperantistoj el ĉiuj landoj: 4-a eldono (enhavas adresojn ankaŭ de Persio, Tunisio, Venezuelo, Kubo, Argentino, Brazilio, Ĉilio, Meksiko, Hindio, Aŭstralio). Prezo 1,50 svisfranko; 3-a eldono —,75 svisfranko; 2-a eldono —,75 svisfranko; ĉio afrankite. Sendu bankbiletojn aŭ neuzitajn poŝtmarkojn!

Adreso: KAREL JELÍNEK (kunlaboranto de BES), prihrádka 60, Královské Vinohrady, Ĉehoslovakio.

PROFESIO SERĈATA — Absolvinto de komerclernejo, kooperativisto, serĉas alian profesion inter germanaj Esperantistoj. Parolas ĉeĥe, Esperante, germane, — Jan Janda, Volarna-Ohare, Ĉehoslovakio.

LETERVESPERO. Esperanta societo Hagen serĉas por siaj gemembroj alilandajn gekorespondantojn. Leterojn kaj poŝtkartojn oni sendu al s-o Hermann Petermann, Hagen i. W., Germ., Fleyerstr. 57.

AĈETO. — Ni deziras aĉeti aŭ interŝanĝi kontraŭ Esperantajoj la jenajn numerojn de ET: 8, 13, 15, 17, 18. — Proponu al grupo Esperanto, Skobelevа 23, Pleven, Bulgarujo.

LETERVESPERO. — Pola Esperantista Societo, Warszawa, str. Królewska 19, petas eksterlandajn samideanojn alsendadi ilustritajn poŝtkartojn por aranĝata letervespero; ĉiu karto estos respondata.

ATENTU! Kolektantoj kaj amatoroj, mi volas vendi kelkajn interesajn kolektajojn po 72 fotografaĵoj laŭ historiaj motivoj: „La Inkvizicio“, teruraj turmentoj al junaj knabinoj, kaj aliaj kolektajoj. Prezo je demando. — **Alfred Menke, Postfach 513, Bremen, Germ.**

Korespondo kaj Interŝango.

S-oj Max Knüttel, Ritterstr., kaj Hans Pischel, Ohlauerstr., Oels i. Schl., Germ., deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn, poŝtkartojn ilustr. kaj Esperantaĵojn kun ĉiulandanoj.

S-oj Richard Geier, Hauptwerkstatt, kaj Heinz Hoffmann, ĉe Nachtigall, Hindenburgstr. 4 b, Oels i. Schl., Germ., deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtkartoj ilustr. kaj poŝtmarkojn kun ĉiulandanoj.

S-o C. C. Trouw, Abcoude, Hollando, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr. (filatelista afranko, bfl.); respondas sammaniere

S-o Arno Schulze, Hohndorf Bez. Chemnitz, Bahnhofstr. 54, Germanlando, deziras korespondi per leteroj kaj poŝtkartoj ilustr. kun la tuta mondo.

200 württembergajn kaj aliajn germanajn poŝtmarkojn mi sendos al tiu, kiu sendos samkvanton al mi. Karlo Steidle, Industriestr. 28, Kornwestheim bei Stuttgart, Germ.

Alfred Freitag, Chemnitz, Kaiserplatz 6, Germ., deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr. kaj poŝtmarkojn kun eksterеŭropanoj, Ruslando, Polujo, Balkano, Estonio, Aŭstrio, Latvio ktp.

Rudolf Pivl, Trautenau, Bohemlando, deziras interkorespondadon kun junularaj grupoj pri iliaj konstitucioj kaj rilatoj al urba ĉefsocieto. Petas ankaŭ statutojn.

Ernst Schneider, Worms a. Rhein, Germ., Speyererstr. 104, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun la tuta mondo. Sendu ĝis 50 pmk.! Serioza ŝanĝo.

Adam Schade, Poznan, ul. Zielona 3, III., Pollando, deziras korespondi kun gesamideanoj de ĉiuj landoj per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj, ankaŭ interŝanĝi poŝtmarkojn.

Mi vendas serion da rusaj sovjetaj bolŝevikaj poŝtmarkoj por unu svis fk. aŭ 3 fr. ik, 10 kč., 75 gmk., antaŭpagote. Mi ankaŭ interŝanĝas poŝtmarkojn. E. Lichtenstein, Bialystok, Sobieska 1, Pol.

Du amikoj: Hermann Dekker, Gen de Lareystr. 99, kaj Johan v. Eerden, Gr. Gasthuis; ambaŭ en Haarlem, Nederlando, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn.

S-o V. Grasser, St. Margareten apud Knittelfeld, Stirio, Aŭstrio, serĉas korespondanjn interrilatojn kun gesamideanoj en Irlando, Skotlando, Norvegio, Grekujo kaj Palestina. Li Esperantlingve babiladas per leteroj, arte ilustritaj poŝtkartoj (bfl.) kaj laŭdezire interŝanĝas poŝtmarkojn.

F-ino Gilberte Bogaert, 19-jara studentino, Klapdorp 16, Antwerpen, Belgujo, deziras korespondadi per bildkartoj.

F-ino Ottilia Lang, privat-oficistino, Brašov, Rumanujo, Strato Kapu-utca, deziras korespondi per leteroj kaj poŝtkartoj ilustr. kun ĉiulandanoj.

Gregoro Lempert, Riga, Latvio, Skolas iela 4 deziras korespondadon kun ĉiuj landoj per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj, precipe kun ekstereŭropanoj.

Geo. J. Kvejtman, Lodz, Pollando, Przejazd 14, deziras korespondi kun ĉiulandanoj per poŝtkartoj kaj leteroj, interŝangas papermonojn, poŝtmarkojn ktp.

F-ino Caroline De Buyser, instruistino, deziras interŝanĝi vidajkartojn kaj tipojn ĉiulandajn. Krijtstraat 37, Berchem-Antwerpen Belgujo.

S-o Tadeusz Kapela, ul. Zórawia 19, Poznan 3, Pollando deziras korespondi pri diversaj temoj per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj kun tutmondaj gesamideanoj.

S-ano M. Alter, Lodz, Pollando, Piotrkowska 87, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj kun la tuta mondo.

Sportistoj: Geo Kvejtman, Lodz, Pollando, Przejazd 14, kaj Bolesław Fajn, Lodz, Gdanska 35, deziras korespondi kaj interŝanĝi sportajn revuojn kun ĉiulandaj sportistoj.

Johano Miravitllas kaj Valls, strato S-ta Domingo n-o 4, 1er piro, Manresa, provinco Barcelona, Hisp., deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

S-o Erik Engdahl, Pl. 5, Norrahammar, Svedujo, deziras korespondi.

S-o Rulf Eduard, studento, Láznê Bêhlohrad, Ĉehoslovakio, deziras korespondadi kun gesamideanoj en la tuta mondo per poŝtkartoj ilustr. (bfl.), poŝtkartoj kaj leteroj; interŝangas poŝtmarkojn.

Fraŭlo Johano Orat, Carretera de Vich 41, Manresa, Hispanujo, deziras korespondi per poŝtkartoj kun gesamideanoj ĉiulandaj.

S-o Ladislao Krisl, instruisto, Dresden 6., Böhmische Str. 21, II., deziras interŝanĝi leterojn kaj poŝtkartojn kun ĉiuj landoj.

S-o Vasilij Aleksandrovič Volkov, Rusujo, Tver, 1. Verhovskaja d. N. 96, deziras korespondi pri aktualaj kaj aliaj seriozaj demandoj.

W. J. Blijers, Nieuwe Schoolstraat 18, G.. Den Haag, Hollando, interŝangas poŝtmarkojn de ĉiuj landoj, escepte Polujo kaj Ĉehoslovakujo.